# TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

*Volumo 51, Numero 6-7, Junio-Julio 2018*

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio Redaktoro: Dmitry Lushnikov, Provleganto: Nicole Else**


## Nova nomo

*Jonathan Cooper*

La Esperanto-Federacio nun havas pli simplan komercan nomon, por faciligi reklamadon: “Esperanto NSW”. Variaĵo de nia emblemo estis kreita por harmonii kun ĝi:

## Raportoj de SBS

*Jonathan Cooper*



Amelia Dunn de SBS vizitis Esperanto-Domon merkredon, la 6-an de junio, por intervjui kelkajn esperantistojn. Ĝis nun tri programoj estis elsenditaj per SBS-radio, po unu en la angla, serba kaj itala. Tiuj ankaŭ estis publikigitaj en la retejo de SBS kiel podkastoj (vidu esperantohouse.org.au/eo/sbs-2018).

## Venonta kunveno prokrastiĝos unu semajnon

Ĉar Dmitry kaj Jonathan ambaŭ estos en aliaj landoj dum la komenco de aŭgusto, la venonta ĉiumonata kunveno prokrastiĝos unu semajnon al dimanĉo, la 12-a de aŭgusto.

## Jarkunveno

La Jarkunveno de la Federacio okazos dimanĉon, la 7-an de oktobro 2018. Oficiala avizo estos sendata al vi ĉiuj antaŭ la 21-a de septembro, kun invito nomumi vin mem aŭ aliulo(j)n kiel estrarano(j)n. Memoru, ke kunvenoj kaj protokoloj estas en la angla (pro leĝo) kaj estraranoj eĉ ne devus ĉiam fizike ĉeesti: iuj foje uzas la Interreton por partopreni de for.

## Pica vespero ĉe Esperanto Domo



La sekva pica vespero okazos sabaton la 21-an de julio je la 6a ptm  ĉe Esperanto Domo.

## La Festivalo Maitland Riverlights

*Andrew Spannenberg*

La Federacio konsentis partopreni en la venonta Festivalo Maitland Riverlights, sabaton, la 13-an de oktobro, de 15:00 ĝis 21:00. Ni provos havi kovritan budon (kun markezo) kiel aliaj grupoj, eĉ se ni devos pagi por ĝi. Ĉiuj estos bonvenaj partopreni.

## Burwood Lingva Festivalo

*Dmitry Lushnikov*

La venonta lingva festivalo okazos la 28-an de julio en la Biblioteko Burwood, laŭ la peto de la biblioteko mem. Milada Kondratieva prezentos Esperantajn kantojn. La temo estos “Esperanto kaj Aliaj Lingvoj”.
www.eventbrite.com.au/burwood-language-festival-2018

## Esperanto-studrondo por komencantoj

*Richard Delamore*



La pasintajn ses semajnojn Dmitry, Kiah kaj Richard ĉiumerkrede gvidas Esperanto-studrondon por komencantoj. La okazo ĉiam ekas je la 6-a vespere en la Esperanto-domo kaj poste moviĝas al proksima drinkejo. La kernajn studantojn ni varbis pere de Amikumu. Ĉiuj estas junaj (inter la aĝo 20 kaj 35) kaj diligente studas kaj uzas Esperanton. Ĉeestas niajn studrondojn nun inter 7 kaj 10 homoj tamen la kerna grupo ĉiusemajne kresketas. Ni opinias, ke la plia sukcesigo de grupo postulas, ke ni daŭrigu la bonan varbadon kaj ritman kunvenadon.

Nia gasto el Usono **Orlando Raola** partoprenos venontan studrondon merkrede la 11-an de julio. Vi povas jam iom konatiĝi kun li spektante la sekvan filmeton:
https://www.youtube.com/watch?v=6UP9xNdkDsE
Ĉiuj estas bonvenaj renkonti lin.

## Membrokotizoj

Dankon al ĉiuj kiuj estis membroj en 2017. La 2018 jaro daŭras. Bonvolu ne prokrasti kaj remembriĝu. Se vi ankoraŭ forgesis, ne estas tro malfrue:
Iru al esperantohouse.org.au/about-us/join
Ni akceptas pagon per kreditkarto, PayPal aŭ ĝiro.

__EFNSW__: Esperanto Domo, Unua Dimanĉo de la monato 11:00 ĝis 13:00
Por ĉiuj senpaga manĝeto, Esperanto Domo , Unua Dimanĉo de la monato 13:00 ĝis 15:00
Kontaktu Jonathan Cooper 0403 358 941

Manlia Esperanta Klubo ĉe Bavarian Beer Cafe, Manlia Kajo
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 *manly@esperanto.org.au*

La Meza Marborda Grupo; 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287
Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Penny Vos (02) 6495 2922

Esperanto-Kafo-Klubo de Kanbero Jaŭde 17:00 la Capital Pancakes, 122 Alinga St.,Civic. Huigh 02 6288 4334 *huighm@gmail.com*

La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo: Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 15:00 – 17:00
*(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: nsw@esperanto.org.au





| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Jonathan Cooper |
| Vic-prezidanto: | Andrew Spannenberg |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Dmitry Lushnikov |
| Estrarano: | Alan Turvey |

# amikumu

Amikumu estas apo (poŝtelefona aplikaĵo), kiu helpos vin trovi kaj kontakti proksimajn esperantistojn – ĉiam, ĉie!

Elŝutu Amikumu
iPhone 4S aŭ iPad 2+:
Android (OS 4.0.3+):




Esploru profilojn kaj esprimu vin

Trovu esperantistojn apud vi ĉiam, ĉie

Konatiĝu kaj renkontiĝu!

La utileco de tia aplikaĵo por esperantistoj estas klara, iusence ĝi estas ĝisdatigo de la plej malnova servo de UEA, la Delegita Reto, kiu same celis plifaciligi kontaktojn inter homoj dum vojaĝoj aŭ pri komunaj interesoj.
– Mark Fettes, la Prezidanto de UEA

En Londono, mi trovis esperantiston apude per Amikumu kaj ni renkontiĝis tutsimple tiel.
Mi apenaŭ povas atendi por uzi ĝin denove!
– Orlando Raola, Prezidanto de Esperanto-USA

## Por disvastigi Amikumu

Plusendu ĉi tiun flugfolion al ĉiuj konatoj per retpoŝto, fejsbuko kaj tvitero.
Plusendu ĉi tiun flugfolion al la organoj de via loka movado.
Printu ĉi tiun flugfolion kaj diskonigu ĝin ĉe via loka klubo.

Se vi volas kontakti la teamon de Amikumu pri gazetaj anoncoj aŭ demandoj, bonvolu retpoŝti nin ĉe

info@amikumu.com
amikumu.com
www.facebook.com/amikumuapp

La Oficiala Sponsoro de Amikumu estas la Universala Esperanto-Asocio